## Leteroj de legantoj

### Pri anglalingvaj loknomoj

Estante nova leganto angla de Scienca Revuo, mi interesiĝis pri "La invado de la Romianoj en Britujo" (SR 4/2002, p. 177-200). Tamen kelkaj loknomoj en la angla lingvo ne ĝustas:
"*Street of Dover*" estas tute malĝusta. Plej ofte oni diras "*straits of Dover*". Oni povas ankaŭ diri "*Dover strait*" aŭ eĉ "*Dover straits*", "*strait of Dover*". (La marista esprimo "*Roads*" kiel "*Rade*" france por eksterhavena atendejo estas alia afero); "*Anglesey*" ĝustas, ne *Angelsay*; "*Graupian Mountains*": supozeble temas pri *Grampian Mountains*; "*Solwafirth*" devas esti *Solway Firth*; "*Ben Macdhuil*" – ĉu *Ben Macdhui*?

*Norman INGLE*
*87, Victoria Road*
*SHOREHAM-BY-SEA / WEST SUSSEX*
GB – BRITIO BN43 5WR

### Pri landnomoj

Plaĉis al mi rimarki, ke la redaktisto de Scienca Revuo presigas **kaj** la Zamenhofan sufikson –uj- **kaj** la neologisman sufikson –i- por la nomoj de landoj, depende de la aŭtoroj. **Li do ne cenzuras tion**. Malĝojigas min tamen, ke unu el la aŭtoroj (nome la redaktisto mem, kiu malŝatas –i- kaj scias ĝian malEsperantecon!) tamen okaze uzadas ĝin en siaj propraj artikoloj !

*Marcelo LEEREVELD*
*12, Heather Grove*
*AU – BELGRAVE SOUTH, VICTORIA 3160*
AŬSTRALIO

### Lum-rapida baro

Ĉar vi kolektas korektojn pri Scienca Revuo, mi devas atentigi, ke troviĝas du eraroj en SR 4/2002 (p. 220) pri mia artikolo: "lum-radio" devas esti lum-radia kaj bv. fine aldoni "baro", do, entute: Grafika klarigo pri la lum-rapida baro.Kvankam en mia artikolo (SR 2/2001, p. 37) mi montris lumradiojn (pli ĝuste "lum-pulsojn") en la diagramoj, ili estas nur rimedo al konkludo, kiu validas por **ĉiaj** objektoj. La "lum-rapida baro" estas iom analoga al la "sona baro" – sed ĝis nun oni ne sukcesis rompi ĝin!

*Wilf G. ATKINSON*
*2, Cherwell Court. Broom Park*
*GB – TEDDINGTON, Middlesex*
BRITIO – TW11 9RT



## Kion cetere opinias la ISAE-anoj?

*Neniu estas apostolo*
*en propra vilaĝo*
*Malnova proverbo*

### La nuntempa Esperanto-movado neglektas gravan strategian elpaŝon

La homo ne ĉiam kaj ĉie restas la sama. "Ĉiu povas aspekti kiel anĝelo aŭ kiel diablo, depende de homaj interrilatoj" (*Lev Tolstoi*). *Marcel Proust* skribis (*Contre Sainte-Beuve* – Kontraŭ S.-B.), ke beletraĵo kreita de iu verkisto "estas produktita de alia memo ol tiu, kiun ni konas en liaj kutimaj manifestiĝoj, en socio, en malvirtoj". La popola saĝeco rimarkis, ke oni pli funde kaj daŭre taksas la konatulojn laŭ certaj nekonvenaj iliaj eble hazardaj, tute netipaj faroj aŭ vortoj, ol laŭ realaj meritoj. En sia vilaĝo ĉiu estas konkreta Johano, Petro, Nikolao kun siaj malfortoj aŭ malvirtoj, do "nekapablaj je noblaj ideoj kaj kredoj de apostoloj". Ofte la Cindrulino atendas okazon...

Fakte nia movado praktikis empirie kaj efike tiun ĉi principon psikologian. Ni memoru, kian pozitivan efikon havis la vojaĝoj de niaj "apostoloj" por informi pri Esperanto, aŭ por aliaj celoj, sed utiligante la okazon apogi la novan ideon. *Lanti, Privat, Andreo Che, Lapenna* kaj pluraj aliaj ĝis la hodiaŭa malmultaj heroldoj bone komprenis, ke neniu ideo – estu ĝi la plej necesa – liberigas sian vojon per simpla racieco. Certe ne necesas, ke oni praktiku hodiaŭ la vojojn de la iamaj religiaj misiistoj, sed niaj personecoj, kiel modernaj homoj diversokaze vojaĝantaj tra la mondo, povas ĉiam uzi la restadojn en la urboj, kaj kune kun la lokaj Esperantistoj serĉi eblecojn, organize kontakti sciencajn, kulturajn, junularajn organizaĵojn kaj simple, amike, senpreme informi pri la fenomeno "Lingvo Internacia", kiu principe interesas ĉiun inteligentan homon de la nuntempo.

Mi aldonu konkretajn ekzemplojn. En 1953, la japana profesoro *Masuo Hukuhara*, partoprenante la Internacian Kongreson de Matematikistoj en *Bucureşti*, salutis la kongresantojn en Esperanto, sen tradukisto. La rumana granda matematikisto, akademiano *Grigore Moisil* tuj intersiĝis pri la ideo, prelegis pri ĝi en la ĉefurbo, en la nacia radio, donis intervjuojn, en kiuj li postulis, ke "la gestudentoj